

PRI LA KONGRESA LOKO 2020 – KEBEKURBO

Suzanne Roy kaj mi (Vilĉjo Harris) vizitis la kongresan lokon por la ILEI-kongreso 2020, dum 2 tagoj en Septembro 2019. Suzanne Roy estas la ĉefa organizanto surloke, ŝi agadas nome de Kebekia Esperanto-Societo.

LAVAL UNIVERSITATO

Ni renkontis la homojn, kiuj respondecas pri loĝado, manĝado, kaj kongres-spaco. Ĉiuj estis afablaj kaj helpemaj. Mi nun raportas pri miaj impresoj.

Laval Universitato estas grandega and iom moderna. Entute 50'000 studentoj studas tie.

LOĜADO

La universitato provizos du tipojn de loĝado.

La unua estas malgranda du-lita ĉambro, kiu ankaŭ havas lavejon, kaj stud-tablojn. La universitato provizas bantukojn, littukojn, kaj sapon. Proksime al ĉiu aro de ok ĉambroj estas granda neceseo/duŝejo.

Bedaŭrinde, ne estis malplena ĉambro havebla, do mi ne povis foti ekzemplon.

La dua tipo estas luksa ĉambro, kiu havas du du-personajn litojn, luksan banĉambbron, fridujon, mikroondan fornon, ktp.

MANĜADO

Estas kafeterio proksima al la dormejo. Ankaŭ en la universitato estas kelkaj restoracioj, 'pub'-oj (trinkejoj) kaj vendejo, kie oni povas aĉeti manĝaĵon.

En la kongresejo estas granda ĉambro, kie pli ol cent personoj povas sidi kaj manĝi formalan manĝon.

Vegana, sen-glutena manĝaĵo estas havebla en la kafeterio kaj por antaŭmendi.

KONGRES-SPACO

Suzanne rezervis salonegon kaj kvar klas-ĉambrojn.

La salonego estas bela kaj moderna, kaj facile entenos ĝis 150 personojn, se estas seĝoj en vicoj (sen tabloj). La ĉambro enhavas podion, projekciilon kaj du ekranojn. Unu mikrofono estas havebla. Ni devas antaŭmendi pliajn mikrofonojn.

Alia ebla aranĝo en la salonego estas seĝoj kaj tabloj, sed ni devas antaŭmendi la ŝanĝon de unu aranĝo al alia.

GRAVA NOTO: Ni ne rajtas uzi niajn proprajn komputilojn en la salonego por projekcii al la ekranoj. Do prezentontoj devas porti memorbastoneton por enmeti en la salonega komputilo por montri prezentaĵojn (PowerPoint) aŭ bildojn.

La klasĉambroj estas modernaj kaj bonaspektaj Ili facile entenas 25 personojn. En ĉiu klasĉambro estas projekciilo kaj ekranaro.

GRAVA NOTO: Malsame al la situacio en la salonego, ni devas porti niajn proprajn komputilojn por projekcii al la ekrano. Laŭ diro, estas facile konekti la komputilon al la projekci-sistemo.

<https://www.ulaval.ca/> Ni estos en pavilono **La Laurentienne**, laŭ la riverega nomo. La fotoj fontas el la retejo de UL, Universitato Laval. Ni ULoj ĉiuj ULumos....

EKSURS-EBLECOJ

KEBEKURBO – LA MALNOVA URBO

Kebekurbo estas la sola fortikigita urbo de Nordameriko norde de Meksiko, kiu ankoraŭ posedas urbajn muregojn. Ĝia malnova urbo estas Monda Kulturheredaĵo de UNESKO de post 1985. La malnova parto de Kebekurbo estas ege alloga por turistoj. Amerikanoj kaj aliaj venas tien por vidi pavimitajn stratojn. Estas multaj restoracioj, muzeoj, kaj alia vidindaĵoj. Estas alta parto sur monteto kaj malalta parto ĉe la riverego Sankta Laŭrenco; funikularo ligas ambaŭ urbopartojn; tajpu ĉe google “Funiculaire Vieux Québec” kaj vi vidos diversajn fotojn.

WENDAKE – INDIĜENA REZERVEJO

Ni vizitis kelkajn turistajn lokojn en Wendake, inkluzive de Onhoüa Cheteke, aŭtenta rekonstruita vilaĝo de indiĝena popolo.